

Matthias Claudius,  
Abendlied

1. Der Mond ist aufgegangen,  
Die goldnen Sternlein prangen  
Am Himmel hell und klar;  
Der Wald steht schwarz und schweiget,  
Und aus den Wiesen steiget  
Der weisse Nebel wunderbar.

Wie ist die Welt so stille  
Und in der Dämmerung Hülle  
So traurlich und so hold!  
Als eine stille Kammer,  
Wo ihr des Tages Jammer  
Verschlafen und vergessen sollt.

2. Seht ihr den Mond dort stehen? -  
Er ist nur halb zu sehen  
Und ist doch rund und schön!  
So sind wohl manche Sachen,  
Die wir getrost belachen,  
Weil unsre Augen sie nicht sehn.

3. Wir stolze Menschenkinder  
Sind eitel arme Sünder  
Und wissen gar nicht viel;  
Wir spinnen Luftgespinste  
Und suchen viele Künste  
Und kommen weiter von dem Ziel.

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto  
*tradukita de Guido Holz*

1. La luno nun ekhelas,  
Steletoj oraj belas  
En la ĉiela klar';  
L'arbaro nigra revas,  
Kaj el herbejo levas  
Mirige sin nebula mar'.

2. Silenta estas mondo  
Kaj en krepuska rondo  
Hejmecas kun favor'  
Similas kalman ĉelon,  
En kiu vi kverelon  
De l'tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?  
Aspekto nur duonas,  
Sed rondas ĝi en bel'.  
Do ankaŭ estas multo,  
Loganta al insulto,  
Okulojn ĝenas la malhel'.

4. Ni homoj tiel vantaj  
Ja estas nur pekantaj,  
Malvasta nia sci';  
Himerojn ni eltrikas,  
Ni multe artifikas  
Kaj perdas celon pli kaj pli.

...

4. Gott, laß uns dein Heil schauen,  
Auf nichts Vergänglichs trauen,  
Nicht Eitelkeit uns freun!  
Laß uns einfältig werden  
Und vor dir hier auf Erden  
Wie Kinder fromm und fröhlich sein!

5. Wollst endlich sonder Grämen  
Aus dieser Welt uns nehmen  
Durch einen sanften Tod!  
Und, wenn du uns genommen,  
Laß uns in Himmel kommen,  
Du unser Herr und unser Gott!

6. So legt euch denn, ihr Brüder,  
In Gottes Namen nieder;  
Kalt ist der Abendhauch.  
Verschon uns, Gott! mit Strafen,  
Und laß uns ruhig schlafen!  
Und unsren kranken Nachbar auch!

5. Vidigu, Dio, savon,  
Pasem' ne veku ravan,  
Ne ĝoju ni pro glor'!  
Fariĝu malafektaj  
Ni kaj al vi respektaj,  
Infane gaju nia kor'!

6. Vi gracu, sen ĉagreni  
El mondo nin forpreni  
Al fin' per milda mort'!  
Kaj post forpren' fidele  
Hejmigu nin ĉiele,  
Sinjoro, Dio, nia fort'!

7. Kuŝiĝu do kun pio  
Vi en la nom' de Dio,  
Jam fridas nokta vent'.  
Per punoj, Di', ne ĝenu,  
Per dolĉa dorm' nin benu,  
Najbaron ankaŭ en turment'.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21).*

*Arg-394-776 (2012-12-24 20:31:03)*

*La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Johann Abraham Peter Schulz (31.03.1747 - 10.06.1800). Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Abraham\\_Peter\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Abraham_Peter_Schulz). Vidu ankaŭ: <http://ingeb.org/Lieder/DerMondi.html>. Tie estas audiobla la meolodio. La muziknotoj troviĝas en <http://www.liederprojekt.org/lied27783.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 – †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*